Hermann Löns,

Vespera parolo

tradukita de Manfred Retzlaff

Se venos iam de l' vivo fin',
Surerikeje sola vi lasu min.
Ne volos resti mi tie ĉi,
Samkiel besto pereu mi.
Sur griza musko mortu mi,
Dum sonas de la kornik' litani'.
Tombigos min vermoj en trankvil',
Dum sonos de l' ŝtormo sonoril'.
Ne volas havi tomb-ŝtonon mi,
Ne estu ŝutata monteto sur ĝi.
Neniu koron', kie mortis mi,
Neniu larmo, nenio, neni'.
Nek vidi nek aŭdi ion volas mi,
Kiel besto foriĝi de tie ĉi.
Neniu ŝtono por mia memor',
Senŝpure mi volas iĝi for.[2]

Traduko de la Germana poemo "Abendsprache" de Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-636-1862 (2013-09-29 17:37:16)

[2] aŭ:
Sen ŝpuro mi volas iĝi for.